

**33-a Jarkolekto \* Marto 2019 \* N-ro 112**



**CAMPILLOS**  
**Apud lagoj kie la naturo ripozas**

Gazeto Andaluza  
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ  
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE  
Belén CAMACHO VILLALBA  
Vicente HERRERA COBO  
Antonio Fabián JIMÉNEZ JIMÉNEZ  
José Carlos PÉREZ ROMERO

## ENHAVO

Esperanto en Andaluzio .....	3
La Dua Mond-Milito en Andaluzio. Bomboj sur <i>La Línea</i> .....	8
Lingva Angulo: AMI .....	12
Poezia Angulo .....	16
79-a Hispana Kongreso de Esperanto .....	18
Asocio kontraŭ la angliĝo de la hispana lingvo .....	19
Turismi en “ <i>Campillos</i> ” .....	22
Paĝoj pri Nia Historio: Manuel Ruiz Maya.....	26
Flamenko: “ <i>El Niño Gloria</i> ” .....	31
Andaluza Kuirarto: “ <i>Pestiño</i> ” .....	33
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio: “La Orakolo de la Templo de Heraklo” .....	35
Krucvortenigmo kaj Rebuso.....	39
Humuro .....	42

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### ➤ Vizito al Grekio pere de Esperanto.

De la 13-a ĝis la 22-a de decembro 2019, Belen Camacho kaj María José Cabezas, profesorinoj en la gimnazio “Almenara” de Velez Malaga vizitis Grekion, ene de la projekto Erasmus+ “Esperanto Komuniko”. La ĉefa celo de ĉi tiu projekto estas pligrandigi la lingvan oferton por la gelernantoj de tiu gimnazio, plibonigi la instruadon de aliaj lingvoj pere de esperanto kaj promocii la valorojn de nia internacia lingvo, kiel bazo de la ideo de la tuteŭropa civitanaro, unuigita, solidara kaj sen lingvaj bariloj.



Krom vizito al gimnazioj ili kontaktis kun grekaj esperantistoj, unuamomente kun Lilian Simou kiu ebligis viziton al Spiros Sarafian, instruanto de la internacia lingvo en Grekio de antaŭ multaj jaroj. Li ankaŭ tradukis verkojn de Platono, Herodoto kaj Plutarko, ankaŭ libron pri la Troja Milito kaj li samtempe regas du paĝojn en fejsbuko en

esperanto, unu pri greka mitologio kaj historio kaj alia pri dokumentoj en esperanto de la unua duono de la pasinta jarcento.



Ĉar la celo de la vojaĝo estas koni kiamaniere oni instruas esperanton, li surprizigis al ni per jena datumo: li estas aŭtoro de greklingva libro-metodo por lerni esperanton en 35 lecionoj kaj ankaŭ li ellaboris kelk-voluman grekan-esperanton vortaron.



Alia esperantisto kiun la profesorinoj vizitis estis Annie Grente, kiun ili jam konis okaze de vizito al la insulo Kreto antaŭ kelkaj jaroj. Annie ricevas plezure esperantistojn de la tuta mondo, ŝi estas volontulino en grekaj NRO-oj kie ŝi instruas la anglan, francan, grekan kaj esperantan lingvojn al tiuj enmigrintoj kiuj venas en Eŭropon. Dum la parolado ŝi rakontis pri la uzata metodo por alkitimigi la lernantojn uzi arabajn, latinajn kaj grekajn alfabetojn.

### ➤ **Kurso de Esperanto en la Universitato de Sevilo**

Jam en la tria jaro okazas kurso de la internacia lingvo en la Universitato de Sevilo kun oficiala akademia agnosko. La kurso okazas lunde kaj marde dum du horoj ĉe la Fakultato pri Turismo kaj Financoj. La instruistoj estas Fernando Estepa kaj Antonio Rodríguez.



### ➤ **Esperanto kaj Mangao en Vélez Málaga**

La gimnazio “Almenara” de Vélez Málaga, vilaĝo en la malaga provinco, fariĝis dum la lasta jaroj la ĉefa kerno rilate la disvastigon de la internacia lingvo inter gejunuloj en Hispanio. La granda laboro plenumita de la profesoro Antonio Fabián Jiménez, membro de nia andaluzia asocio, helpis la diskonigon de nia lingvo inter liaj

gelernantoj, li ankaŭ helpis la lernon de esperanto fare de aliaj profesoroj de la gimnazio. Tiel, dum ĉi tiu kurso Fabián sukcesis enirigi la instruadon de Esperanto, agnoskita kun akademia valoro, en tiu gimnazio, ene de stud-objekto kun la nomo “Esperanto kaj Eŭropaj Valoroj”.

Ene de la agadoj celantaj la uzon de la internacia lingvo kiuj okazis dum ĉi tiu kurso en la gimnazio “Almenara”, fine de la jaro 2019 oni organizis konkurson pri desegnoj manga-stilaj en esperanto. Memoru, ke mangao estas japana bildliteraturo jam tute disvastigita tra la tuta mondo. Oni proponis al la gelernantoj realigi siajn proprajn manga-stilajn desegnaĵojn aldonante tekston en esperanto. Ĉiujn desegnaĵojn ricevitajn oni ekspoziciis sur la muroj de la lernejo kaj la kvar plej bonaj estas elektitaj por ornami la informan afiŝon de la gimnazio en la Manga-Halo de la urbo.

Okaze de tiu arta prezentado okazanta en Vélez Málaga Fabián profitis por realigi esperanto-atelierojn kaj informi al la ĝenerala publiko pri nia lingvo. Temis pri la diskonigo de “La Jogo de la Lingvoj”, difino pri esperanto eldirita de Fabián mem. La esperanto-atelieroj vekis multe da intereso inter la ĉeestantoj kaj tiuj kiuj tre interesiĝis pri nia lingvo ricevis malgrandan kurson pri ĝi.



Fabián Jiménez, la unua dekstren, kune kun aliaj profesoroj de la Gimnazio “Almenara” de Vélez-Málaga.

*Jen kelkaj el la manga-stilaj  
desegnaĵoj kun esperanto-teksto  
prezentitaj dum la konkurso.*



## LA DUA MOND-MILITO EN ANDALUZIO. BOMBOJ SUR *LA LÍNEA DE LA CONCEPCIÓN*

*La Línea de la Concepción* (prononcu: “la línea de la koncepcion”) estas hispana urbo troviĝanta tuj apud la brita kolonio Ĝibraltaro. Brit-nederlanda ŝiparo okupis Ĝibraltaron en la jaro 1704, dum milito inter eŭropaj regno-landoj pro la nomumo de nova hispana reĝo, fakte la reĝo Karolo la 2-a mortis sen idaro kaj pro tio la ĉefaj eŭropaj potencoj luktis en Hispanio por nomumi unu aŭ alian reĝon. La milito finiĝis per traktato subskribita en la nederlanda urbo Utreĥto, la hispana regno havigis la ĝibraltaran urbon al Britio, ekde tiam la teritorio estas kolonio laŭ Unuiĝintaj Nacioj.



Ĝibraltaro kaj *La Línea de la Concepción* tuj apude

Ekde la unuaj jaroj de la invado, la ĉiopova brita imperio emis plilarĝigi la teritorion de la kolonio kaj tiel, iom-post-iom oni okupis la ter-kolon kiu unuiĝis Ĝibraltaron al la cetera Ibera Duoninsulo. Por eviti tiun trompan ampleksigon la hispana registaro decidis konstrui fortresojn apud la kolonio. Ĉirkaŭ du grandaj fortresoj naskiĝis nova urbo, kiu ricevis la nomon *La Línea de la Concepción* aŭ simple *La Línea* (La Linio), la nomo memorigas la landliman linion ekzistantan inter la kolonio kaj la apudaj zonoj.



La inaŭguro de la Suez Kanalo en la jaro 1869 pligrandigis la gravecon de la milita bazo en Ĝibraltaro, ĉar la Mediteranea Maro fariĝis la plej rekta linio por vojaĝi orienten. La invado de la kolonio fare de la germana armeo aŭ la detruo de la milita bazo dum la dua mond-milito fariĝis milita celo. Pro tio kelkfoje la kolonio suferis bomb-atakojn de la itala aer-armeo, ĉar Italio estis aliancano de Germanio dum tiu milito.



Grandegaj reflektiloj lumigas nokte la ĝibraltaran ĉielon por detekti malamikajn aviadilojn en la jaro 1942

La 12-an de julio 1941 itala bomb-aviadilo fluganta el Sardinio celis ataki Ĝibraltaron kaj pro tio ĝi ĵetis tri bombojn. Neniu el tiuj bomboj falis sur la britan kolonion sed ja sur la apudan urbon *La Línea de la Concepción*.

Du el tiuj bomboj ne ekspluatis, ĉar ili falis sur la sablon de plaĝo, tamen la tria bombo ekspluatis ĝuste ĉe strat-kruciĝo kaj tri konstruaĵoj restis tute detruitaj, krome la ekspluado ankaŭ difektis la elektran centralon kaj pro tio la urbo restis tute mallumigita. Soldatoj kaj policanoj, kun la helpo ankaŭ de civitanoj laboris sen-ĉese por elfosi la viktimojn, la reflektoroj de la armeaj kamionoj lumigis la lokon. Baldaŭ aperis kadavroj de kvin homoj, ĉiuj civilaj enloĝantoj de

la urbo *La Línea*, krome multaj aliaj homoj suferis vundojn.



Unu el la konstruaĵoj detruitaj okaze de la bombardado de la 12-a de julio 1941 en *La Línea de la Concepción*

La sekvantaj tagoj itala aviadilo pruvis denove ataki la ĝibraltaran havenon. Okaze de unu el tiuj atakoj itala aviadilo alproksimiĝis al la urbo Alheciro kaj kontraŭ-aviadila kanono de la hispana armeo pafis kontraŭ ĝi. La aviadilo rapide ĵetis sen-cele siajn bombojn kvankam ĉi-foje ili ekspluatis ĉe sen-homa zono.

Kiam la milito finiĝis Italio decidis mon-kompensi al Hispanio per 250.000 dolaroj, tamen la pago fine ne realiĝis, pro la fakto ke Hispanio ŝuldis al Italio eĉ multe pli ol tiu mon-kvanto pro la helpo ricevita de Italio dum la civila milito.

**aeu**

**Andaluzia Esperanto - Unuiĝo**

**Asociación Andaluza de Esperanto**

## ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

## HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac  
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

## Lingva Angulo

### AMI



Lingvisto iam skribis, ke la plej efikaj gramatikaj ekzemploj, se temas pri instruado de lingvoj, devas ĉiam uzi la verbon *ami* (amar), ĉar ili estas tre allogaj por homo eklernanta novan lingvon. Sendube tiu aserto ankaŭ estas certa okaze de instruado de la internacia lingvo.

Nu, la verbo AMI havas kvar ĉefajn signifojn, du el ili memorigas pri

homaj rilatoj, la du aliaj pri uzo aŭ sperto de aĵoj aŭ agoj. Ni vidu:

Ami estas:

- 1) havi koran inklinon al iu.
- 2) Havi seksan inklinon al iu.
- 3) Plezure uzi ion.
- 4) Plezure sperti agon.

Verdire, la ĉefa signifo, se paroli pri homaj rilatoj, estas tiu unua: *havi koran inklinon al iu*, ĉar se oni parolas pri seksa inklino estas pli uzata la verbo *amori*, tio estas seksumi kun la celo havigi plezuron al si kaj al sia(j) partnero(j). Do, ni pristudu tiun unuan signifon de la verbo *ami*.

Ami, kiel jam dirite, estas havi simpatian aŭ koran inklinon al iu. Pro la fakto, ke oni amas ion/iun, tiu amata homo aŭ objekto devas aperi sub akuzativa formo (-n). Tiel:

Mi amas mian filon	Amu domon novan kaj amikon malnovan.
<i>Yo amo a mi hijo.</i>	<i>Ama una casa nueva y un viejo amigo</i>

La viro, kiun mi amas, amas ankaŭ mian monon.  
*El hombre, a quien yo amo, ama también a mi dinero.*

Ŝi tiel amis sian filon, ke ŝi estis preta doni al li sian vivon.  
*Ella amó a su hijo de tal manera, que estaba dispuesta a darle su vida.*

Tiu amo ne necese rilatas al homoj, oni povas ankaŭ ami objektojn, agojn, ktp. Ni vidu:

La amo al la kartludo tute ruinigis lin.  
*El amor a los juegos de cartas le llevó totalmente a la ruina.*

Mi amas vojaĝi ofte al Afriko.  
*Yo amo viajar a menudo a África.*

En la hispana lingvo la verboj “amar” (ami) kaj “querer” (voli) memorigas similajn aferojn. Tamen, tio ne okazas en esperanto, tiel, se oni amas iun, ne eblas diri “mi volas vin”, tute ne. La verbo *voli* signifas koncentri la atenton al la ideo de ia ago, por ke ĝi efektiveĝu, ĝi tute ne rilatas al inklinoj al iu homo.

Ni vidu nun vortojn kiuj devenas el *amo-ami*:

Ama: temas pri adjektivo esprimanta rilaton al amo.

Li ekigis amajn rilatojn al ŝi.  
*El comenzó unas relaciones amorosas con ella.*

Amanto: ĉi tiu vorto parolas pri tiu, kiu sekse amas aŭ pri la fakto ke io estas tre plaĉa aŭ kara. Ekzemple:

Lia edzino ne sciis, ke li vojaĝis al Kadizo kun sia amantino.  
*Su esposa no sabía, que él viajó a Cádiz con su amante.*

Mi estas amanto de rapidaj aŭtomobiloj.  
*Yo soy amante de los coches rápidos.*

Oni povas aldoni “-amanto” al objekto aŭ ago por montri, ke plaĉas al ni ion aŭ fari ion, ekzemple:

Mi estas lingvo-amanto. (ankaŭ “lingv-amanto)  
*Soy un amante de las lenguas.*

Mi estas aventur-amanto. (ankaŭ aventuro-amanto)  
*Soy un amante de las aventuras.*

Amato: temas pri la amata homo.

Mia kara amatino vizitos min morgaŭ.  
*Mi querida amada me visitará mañana.*

Amema: inklina al amo.

Li havas multajn amatinojn, vere li estas amema.  
*Tiene muchos seres queridos, realmente es amoroso.*

Aminda: meritanta amon.

Kia aminda bebo !  
*¡Qué bebé tan adorable! (digno de amor).*

Amindumi: peni plaĉi al iu homo.

Cele amindumi sian najbarulinon, li donacis al ŝi belegajn florojn.  
*Con el objeto de cortejar a su vecina, él le regaló a ella unas flores bellísimas.*

Enamiĝi: eksenti fervoran amon por iu

Mi scias, ke li enamiĝas al ŝi.

*Yo sé que él está enamorado de ella.*

Atentu, la subjekto en frazoj kun verbo *enamiĝi* estas la homo kiu sentas koran inklinon al alia homo.

Senama aŭ sen-ama: adjektivo esprimanta la mankon de amo.

Memamo: amo al si mem.

Sinamo: egoismo.

Homamo: ĝenerala amo al la tuta homaro.

Kompreneble oni povas antaŭmeti la prefikson MAL- por sciigi pri kontraŭaj aferoj, tiel:

Malami: deziri ion malbonan al iu, forte malinklini al io.

Malaminda: meritanta malamon.

Do, se vi enamiĝas al iu, tio estas, se vi estas enamiĝinta, ne hezitu montri vian amon al tiu(j) homo(j) kaj simple diru:

*Mi amas vin !*



## Poezia Angulo


### Rimo XII

Verdon de okuloj viaj,  
kial, vi, knabino, plendas?  
Verdas tiuj de najadoj,  
verdas tiuj de Minerva,  
verdas same la pupiloj  
de hurioj mahometaj.

Verdo garnas kaj ornamas  
la arbaron primaveran.  
Inter siaj sep koloroj  
ĉiel-arko ĝin prezentas.  
Verdas ankaŭ la smeraldoj  
kaj la glora laŭr' poeta.  
La espero kaj la maro  
al si verdan veston metas.

Estas via bela vanto  
rozo, kiun prujno tegas,  
kaj vidiĝas tra la perloj  
la petal-karmino freŝa.

Tamen mi scias,  
Ke vi tre plendas,  
Ĉar vanton fuŝas  
-tion vi pensas-  
l'okuloj verdaj.



*Gustavo Adolfo Bécquer*



Sed pupiloj viaj ŝajnas  
-verdaj, glitaj kaj malsekaj-  
fruj migdalofolioj,  
kiuj pro zefiro tremas.

*Gustavo Adolfo Bécquer*  
*Sevilo 1836, Madrido 1870*  
*Romantika poeto.*

Tradukis: Fernando de Diego



### ***Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?***

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

*Gazeto Andaluzia* estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: [cordoba@esperanto.ac](mailto:cordoba@esperanto.ac)



De la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2020 okazos en la urbo Comillas (Santander), la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Ne hezitu ĉeesti la kongreson, tie vi povos ĝui mirindan esperanto-etoson. Laŭ la programo jen kelkaj partoprenindaj agadoj:

- Ekskursoj: Santillana del Mar kaj Groto “El Soplao”.
- Prelegoj de José Antonio del Barrio, Ana Manero, Lorenzo Noguero, Ilona Koutny, Antonio Valén...
- Ateliero: Lernu kaj ludu “Kantabran Kegloludon” (bolo palma).
- Koncertoj: JoMo, Kaj Tiel Plu, Kjara...

Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe:

<https://www.esperanto.es/kantea/category/congresos/>

Ĝis januaro 2020 aliĝis: 111 homoj.

## Asocio kontraŭ la angligo de la hispana lingvo

*José Carlos Pérez Romero  
Lucena (Kordovo)*

Homoj bezonas krei grupojn ĉar izolece oni ne povas plenumi kelkajn taskojn, ĉu pro la fakto, ke oni bezonas grandan klopodon, ĉu pro la daŭro de la tasko, kiu foje estas pli granda ol la vivo de ununura homo.

La plej grava karaktero de kelkaj el tiu grupoj, kiel asocioj, ne baziĝas sur la fakto, ke oni serĉas ĉefe monon por la membroj, sed ja oni deziras atingi celon kiu estas konsiderata ege interesa por ĉiuj aŭ por la plejmulto el la homoj. Tiel, se oni rigardas la administraciajn registrojn kie estas devige enskribi tiujn asociojn, ni vidas, ke ekzistas multaj grupoj kaj pri multaj temoj: helpemaj, sciencaj, kuracistaj, sportaj, juraj, kulturaj, artaj, politikaj...kaj ankaŭ ekzistas asocioj kies celo esence lingvistika. Kelkaj el ili havas kiel celon favorigi la instruadon de konkreta eksterlanda lingvo -aŭ de ĉiuj lingvoj-; aliaj defendas unu aŭ aliajn lingvojn -hispanaj- kontraŭ unu aŭ alia: ekzistas ankaŭ asocioj por lingvo-instruistoj; ankaŭ aperas asocioj kies celo estas la adopto de universala, neŭtrala lingvo, kiel esperanto... Rilate ĉi tion, tiu asocio kiu ne ekzistas estas tiu kiu celas eviti ion kio laŭvide estas okulfrapa: ke la angla lingvo ne estas reale neŭtrala universala lingvo kiel tiu kreita de D-ro Zamenhof.



Bedaŭrinde, nuntempe eĉ la plej obstinaj defendantoj de kiu ajn lingvo -ĉiam unu kontraŭ alia aŭ aliaj-, ne dubas pri la neceso konsideri la Ŝekspiran lingvon kiel lingvon por la universala komunikado kaj ankaŭ ne tutklare kontraŭas al la fakto, ke tiu lingvo devas esti studata kaj uzata de ĉiuj homoj -sendube ambaŭ aferoj tuŝas negative tiujn lingvojn kiujn ili pasie defendas-, tio ja vere okazas, ĉar jam multaj homoj opinias, ke la angla lingvo estas “esperanto de la 21-a jarcento”.



Ni ne povas esti surprizigitaj pro la fakto, ke nur malmultaj hispanoj ne miras la anglan lingvon -do ankaŭ la anglo-saksajn landoj-. Ankaŭ ne estas malofte vidi, ke preskaŭ ĉiuj akceptas, ke la uzo de la angla lingvo en la edukado ne estas deviga. Ankaŭ, ne estas strange vidi, ke preskaŭ ĉiuj ricevas volonte, sen opozicio, ĉiujn anglajn vortojn amase disvastigitaj, necesaj aŭ ne, kvazaŭ tiuj vortoj estus trezoroj.

Tamen, fine de la jaro 2017 enskribiĝis en la administracia registro pri asocioj la Asocio por la Defendo de la Lingva Havaĵo de Hispanio, kies celo, ĉefe, estas vidigi al civitanoj la danĝeron pri la angligo de la hispana lingvo. Tiuj ni kiuj apartenas al ĉi tiu asocio sekvas la ekzemplon de aliaj jam ekzistantaj en Francio kaj en Germanio, kies celo estas pure lingvistika -do, ĉiuj rajtas esti membroj sendepende de ideologioj aŭ religiaj kredoj-. Krome, la Asocio por la

Defendo de la Lingva Havaĵo de Hispanio ne serĉas kaŭzi disputojn inter tiuj hispanoj parolantaj la kastilian lingvon kaj tiuj kiuj parolas aliajn regionajn lingvojn.

La celo estas defendi ĉiujn lingvojn de Hispanio ĉar ĉiuj ili riskas, frue aŭ malfrue, esti anstataŭigitaj de la angla lingvo. Povus okazi, ke la asocio atingus la proponitan celon: ke ene de ĝi renkontiĝos multaj homoj kiuj sukcese haltigus la angligon de la lingvo. Povus okazi, male, ke ni fiaskus -se tiel, la angligo venkus-; eĉ povus okazi, kiel okazas ofte, ke la vojo komencata de kelkaj homoj povus esti daŭrigota de aliaj pli sukcese -tiel, naskiĝus asocioj kun la sama celo ol tiu de ni, sed pli efikaj, tiel ili trovus manierojn pli efikaj kaj inĝeniaj por eviti, ke la angla lingvo fariĝos la ĉefa lingvo de Hispanio-.

Nur la tempo diros sian diron.

ASOCIACIÓN PARA LA DEFENSA DEL PATRIMONIO LINGÜÍSTICO DE ESPAÑA 

[Inicio](#) [Sobre nosotros](#) [Dirección](#) [Colabora](#) [Protección de datos](#)

PELLAND

DISPARATES DE LOS ANGLÉSSES (I)  
1 febrero, 2020  
Uno de los argumentos que vemos que los angliómanos esgrimen con

HACER SENTIDO  
1 febrero, 2020  
La expresión hacer sentido suele considerarse mera imitación del to [...]

STOP  
20 febrero, 2020  
Hace tanto tiempo que la señal de stop está en nuestras carreteras que

CONTRA LA ANGLICIZACIÓN

Interreta paĝo: [defensadelidioma.com](http://defensadelidioma.com)

## *Turismi en ...* CAMPILLOS (Malago)

Norde de la malaga provinco, meze de oliv-arbaro kaj cerealplantejoj kaj tuj apud belegaj lagetoj kie haltiĝas cikonioj kaj flamengoj, troviĝas Campillos (prononcu: *Kampiĵos*). Oni fondis la vilaĝon en la sama jaro kiam Kristoforo Kolumbo vojaĝis unuafoje en Amerikon, tio estas en la jaro 1492, kiam la katolikaj gereĝoj rajtigis la kreon de nova vilaĝo. Tamen ne temis pri la unua sidiĝo en tiu zono, ĉar apude al Campillos troviĝis ceramikaĵoj kaj kelkaj moneroj de iberomia setlejo.

La definitiva fondiĝo de la vilaĝo ŝuldiĝis al la pacigo de la regiono post la konkero de la apuda urbo *Teba* fare de la kastiliaj trupoj de *Ramírez de Guzmán*, tio favorigis la alveno de novaj enloĝantoj de la sevila vilaĝo *Osuna* kiuj laboris kiel bruto-bredistoj kaj karbo-faristoj, pro la fakto ke apude abundis kverko-arbaro kaj paŝtejoj por la brutaro.



Blazono de  
CAMPILLOS

Baldaŭ la pajl-kabanoj fariĝis ŝtonaj domoj, stariĝis la unua preĝejo (jaro 1536) kaj jam en la jaro 1680 Campillos definitive sendependiĝis el la municipa vidpunkto, ĉar ĝis tiam ĝi dependis administracie de la apuda *Teba*.

En la 19-a jarcento la vilaĝo moderniĝis, oni konstruis belajn publikajn spacojn, kiel la parko *José María Hinojosa* aŭ la ĝardenoj de la Placo *España*. Komence de la 20-a jarcento la politika vivo de la vilaĝo estis afero de malmultaj familioj, ĉu konservativaj ĉu

liberalaj el la politika vidpunkto, tamen ĉiuj ili apartenantaj al la ekonomia elito de la vilaĝo. La diktaduro de *Primo de Rivera* dum la 2-a jardeko favoris publikajn konstruaĵojn, tiel oni konstruis novan lernejon, merkaton, civil-gvardian kazernon, tombejon kaj oni starigis akvan distribu-servon.

Kiam oni proklamis en Madrido la Hispanan Respublikon en la jaro 1931 la laborista movado en Campillos estis sufiĉe grava, tiel okaze de la unuaj municipaj balotadoj la socialisma partio venkis, tio favoris la konstruon de popolaj loĝejoj. En la jaro 1975 oni konstruis basenon en la rivero *Guadalteba*, tio provokis la malaperon de la vilaĝo *Peñarrubia*, kies teritorio ekde tiam apartenas al Campillos.

Nuntempe, Campillos havas pli ol 8.000 enloĝantojn kies ekonomiaj rimedoj baziĝas sur la ter-kulturado kaj la brutar-bredado, lastatempe ankaŭ estas grava la led-industrio.

## Monumentoj

### Preĝejo de la Virgulino de *Reposo*



La ĉefa monumento de Campillos estas la preĝejo de la Virgulino de *Reposo*, starigita en la 16-a jarcento, kvankam oni modifis ĝis dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj. La ĉefa fasado estas barok-stila kaj ĝi estas konsiderata kiel unu el la

plej belaj preĝejoj en la *Antequera*-regiono.

## Lagetoj de Campillos



Ĉe la municipa teritorio de Campillos troviĝas 8 lagetoj konsideritaj kiel natura rezervujo, tiel haltiĝas flamengoj kaj cikonioj survoje en Afrikon.

## **Festoj**

### Somera Foiro

Meze de aŭgusto okazas tipa andaluzia forio. Dum tiuj kvar tagoj oni provas revivigi la popolajn kantaĵojn de la zono, ĉefe la fandango kaj la malagaj kantaĵoj.

### Religiaj Festoj

Sankta Benito estas la patrono de Campillos, post popola decido en la jaro 1629.





Tiel, meze de julio okazas popola festo honore al ĉi tiu sanktulo.

La religia paska festo en Campillos havas sevilajn influojn. Ekzistas kvin kunfrataroj kiuj procesias dum la Sankta Semajno. Similaj al tiuj de Sevilo ankaŭ paradas “romiaj soldatoj” sub la gvidado de “kapitano” ĉiujare elektita de la kunfrataro.

### Gastronomio

La plej tipaj manĝaĵoj de Campillos baziĝas sur la naturaj produktoj tie ekzistantaj, tio estas oliv-oleo, faruno kaj porkaĵoj.

La *Porra Campillera* estas la loka varianto de la gazpaĉo, ellaborita de pano, tomato, oliv-oleo, kapsiko, ajlo akompanita de pecetoj da ŝinko.

Dumpaske oni ellaboras tipajn manĝaĵojn, kiel kuirajo de lentoj kaj faboj. Ankaŭ estas eble gustumi tipajn dolĉaĵojn, ellaboritaj ĉefe dumpaske, kiel *bolos de aceite*. Bongusta estas ankaŭ la batata pasteĉo.

*Venont-numere TURISMI EN ....  
NERVA (Onubo)*



## Paĝoj pri Nia Historio

### ***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio***

***Manuel Ruíz Maya***  
*La kordova psikiatro*

Antaŭ kelkaj numeroj de nia revuo ni jam preparolis D-ron Ruiz Maya, okaze de la 75-a datreveno de lia morto, pafita, fare de la ribelintoj dum la civila milito en Hispanio. Tamen, estas necese dediĉi kompletan paĝaron pri ĉi tiu elstara figuro de la kordova intelektularo, kiu ankaŭ estis esperantisto.

Manuel Ruiz Maya naskiĝis en la vilaĝo *Espiel* (Kordovo) en la jaro 1888. Lia patro, advokato kaj poste juĝisto, kaj lia patrino, piema kaj leg-avida, influis sur la kultur-amo kaj la

etiko de la juna Manuel. Li sekvis la medicinan karieron en la Universitato de Granado, studoj kiujn li finis en la jaro 1910. Lia unua-labor-posteno estis la kuracista servo de la Minista Kompanio de *Cerro Muriano*, vilaĝeto apud Kordovo kie abundis karbo-minejoj. Lia lukto favore al la viv-kondiĉoj de la ministoj, tiutempe ege mizeraj, provokis lian demision nur unu jaron post la nomomu de Ruiz Maya kiel kuracisto. Tiam, li revenis en Kordovon kie li laboris en la Municipa Medicina Servo, ĉefe en la prizorgado de malriĉaj virinoj kaj orfoj.

En la jaro 1913 li doktoriĝis en la Madrida Universitato post defendi tezon pri labor-akcidentoj, tio pruvas sian grandan dediĉon al la plibonigo de la vivo de la laboristaro. Ankaŭ en tiuj jaroj, ĝuste en



Manuel Ruiz Maya  
1888 - 1936

1916, li finis siajn studojn kiel instruisto, tiam li eniris en la Reĝa Akademio pri Scienco kaj Beletro en Kordovo, sendube la plej grava kultura institucio en la urbo.



Sidejo de la Reĝa Akademio de Scienco kaj Beletro en Kordovo, institucio kiu disvastigis Esperanton en Kordovo dum la 2-a jardeko, al kiu apartenis kiel membro D-ro Ruiz Maya ekde 1916.

La unua mencio pri la esperantisteco de Manuel Ruiz Maya okazas en la jaro 1917, kiam la tiama prezidanto de la Kordova Esperanto-Grupo, S-ro Francisco Serrano Olmo, sciigas lian nomon ene de artikolo publikigita en ĵurnalo. Li diris pri la D-ro Ruiz Maya, ke li estas unu el la plej alt-valoraj kultur-amaj membroj de la kordova esperantistaro. En tiu sama jaro li jam estis voĉ-donanto de la Kordova E-Grupo kaj post kelkaj jaroj, li estis sekretario de la asocio.

Kiam li lernis la internacian lingvon? Nu, neniu ekzakta informo ekzistas pri tio, tamen estas necese elstari la fakton, ke ene de la ministaj sindikatoj en Kordovo disvolviĝis favora opinio rilate Esperanton. Tiel en *Peñarroya-Pueblonuevo*, ĉefurbo de la mineja zono de la kordova provinco, la ministaj sindikatoj eĉ finace apogis kaj organizis kursojn de esperanto por ministoj kaj ilia idaro. Do, verŝajne, Manuel Ruiz Maya ekkontaktis, aŭ almenaŭ eksciis pri la ekzisto de la lingvo kaj la movado esperantista, kiam li estis kuracisto en la minejoj de *Cerro Muriano* kaj sendube li ekigis aŭ perfektigis sian konon pri la

internacia lingvo kiam li estis membro de la Reĝa Akademio pri Scienco kaj Beletro en Kordovo, ĉar ene de tiu kultura institucio la agado favore de Esperanto estis konstanta.




Sur la fotografaĵo homoj en Madrido fervore apogas la proklamon de la Hispana Respubliko en aprilo de 1931.

En Kordovo D-ro Manuel Ruiz Maya proklamis la naskiĝon de nova politika sistemo el la balkono de la Urbodomo, Francisko Azorín Izquierdo hisis la novan flagon, ili ambaŭ estis esperantistoj.

Manuel Ruiz Maya ankaŭ estis aktiva ĵurnalisto, li estis ĉefredaktoro dum multaj jaroj de la monata revuo *Ideal Médico*, oficiala organo de la Andaluza Regiona Kuracista Asocio. Tra multnombraj artikoloj de li verkitaj dum pli ol dek jaroj, videblas lian intereson rilate la neŭro-psikiatrion. Li ankaŭ fondis kaj estris la Psikiatria Hospitalo de Kordovo en la jaro 1927. Dum tiuj jaroj li ankaŭ ekinteresiĝas pri politiko, tiel li ekigis kontaktojn kun Blas Infante kaj kun respublikaj kaj andaluzisma organizaĵoj. Li fariĝis aktiva membro de la Radikala Respublikana Socialisma Partio, kies sekcio en Kordovo li estris. En februaro de la jaro 1930 li kreis la “Grupon de Kordovaj Intelektuloj” kaj pro tio oni petis lin proklami la Hispanan Respublikon el la balkono de la urbodomo de Kordovo en aprilo de 1931. Li tion faris tuj apud alia elstara kordova esperantisto, Francisko Azorín Izquierdo, kiu hisis la novan tri-koloran hispanan flagon.

Post la alveno de la respublika politika sistemo en Hispanio la nova registaro nomumis lin guberniestron en la provinco Almerio. En la jaro 1933 la Prezidanto Manuel Azaña nomumas lin ĝeneralan direktoron pri malliberejoj, li profitis tiun postenon por redakti novan reglamenton por la hispanaj prizonoj, kune kun aliaj elstaraj politikistoj kaj juristoj, kiel Victoria Kent kaj Luis Jiménez de Asua.



D-ro RUIZ MAYA estis la aŭtoro de imponaj verkaĵoj pri psikiatrio en Hispanio.

En la jaro 1934 li decidis forlasi sian politikan vivon kaj nur unu jaro poste ankaŭ sian medicinan karieron pro san-problemoj. Kiam la hispana armeo en la nordo de Afriko ribeliĝis en julio de 1936, kaj tiel komenciĝis la hispana civila milito, la puĉo triumfis en la urbo Kordovo, kie loĝis denove D-ro Ruiz Maya. La novaj aŭtoritatuloj decidis la areston de Manuel Ruiz Maya en lia propra hejmo la 14-an de aŭgusto 1936. Tamen, du tagoj poste oni elprenis lin kaj fore de la urbo tuj apud aŭto-ŝoseo li mortis pafite kiam li estis nur 48-jaraĝa.

Hodiaŭ la eminenta gravulo Manuel Ruiz Maya estas agnoskita kiel unu el la pioniroj de la hispana psikiatrio kaj en la urbo Kordovo oni decidis nomigi straton per lia nomo. Krom lia kariero kiel kuracisto kaj politikisto li verkis medicinajn, filozofiajn, literaturajn kaj politikistajn verkojn, tiel la romano *“Yo y los demás”* kiam li estis apenaŭ 26-jaraĝa. Poste novajn tekstojn li verkis, kiel *“La ciudad del*

*deber*”, “*Quiero ser hipócrita*”, “*Los libertadores del campo*”, “*Los incultos*”. Eĉ teatro-verkon, “*De espaldas*”, li verkis en la jaro 1935 kiam li forlasis sian politikan kaj profesionan vivon. Dekoj da aliaj tekstoj sciencaj kaj literaturaj eliris el sia menso.

Pri Manuel Ruiz Maya oni diris, ke li estis kultur-ama, senlaca vojaĝanto, elstara preleganto, defendanto de la malriĉuloj, amiko de filozofoj kaj psikiatroj kaj nun ni devas aldoni ankaŭ... esperantisto.



Strato “Doctor Manuel Ruiz Maya” en Kordovo nuntempe



Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
Apartado de Correos 611  
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

## FLAMENKO

### *El Niño Gloria*



Rafael Ramos Antúnez naskiĝis en Jerezo en la jaro 1893 ene de cigana familio konata kiel la familio *Frijones*. En tiu etoso estis eble spiri la flamenkan arton, tiel du el siaj fratinoj *Luisa la Pompi* kaj *Manuela la Sorda* estis elstaraj flamenkaj kantistinoj. Rafael laboris dumtage en la kamparo kaj nokte li kantis en flamenkaj trinkejoj de Jerezo, unu el la plej gravaj luliloj de la flamenka arto.

Baldaŭ oni diskonigis la famon de tiu juna jerezano kiu kantis superbe kristnaskan flamenkan kantaĵojn, en unu el ili ripetiĝis ofte la vortoj *niño* (infano) kaj *gloria* (gloro), tiel li ricevis en la flamenkaj rondoj la krom-nomon “El Niño Gloria”. El Jerezo li marŝis en Sevilon, Madridon kaj Barcelonon, tie li partoprenis en samaj spektakloj kun la plej famaj flamenkaj kantistoj. Li estis ege konata ene de la flamenka mondo dank’al la fandangoj kaj ĉefe al bulerioj, kiujn li adaptis laŭ persona stilo kiu ekde tiam nomiĝas “*las bulerías del gloria*” (bulerioj de la infano gloro).


La flamenka dinastio de la familio ne finiĝis kiam Rafael “*el Niño Gloria*” forpasis en Sevilon en la jaro 1954, tiel lia nepo Vicente Soto “Sordera” nuntempe estas unu el la plej konataj flamenkaj kantistoj en Hispanio.

Fandangoj de “El Niño Gloria”

De via am' sklavo humila  
mi ne povas esti, laŭ vi deziras;  
sklavo via mi estos plezure  
se vi al mi tutklare diras,  
ke mi estas via amo nure.

\*\*\*\*

Venos al vi iam la tago  
kiam pro mia am' vi larmos plore;  
kun plorego tiel vast-mara,  
ke vi abomenos horore  
tiun al vi en la mond' plej kara.





## ANDALUZIA KUIRARTO

### *Pestiño*

La *pestiño* (prononcu: “pestinjo”) estas tipa andaluzia dolĉaĵo ellaborata kutime dum Kristnasko kaj Pasko. La origino de ĉi tiu bongusta dolĉaĵo troviĝas en la araba gastronomio, pli konkrete en la andalusa receptaro ĉar ĝi intime rilatas al maroka *shebbakiyya*, manĝata ĉefe dum la Ramadanano monato. La vorto *pestiño* devenas el la vulgara latino *pristinium* (molaĵo) kaj ĝi aperis unuafoje en la literaturo en la 16-a jarcento, ene de la libro “*La Lozana Andaluza*” de Francisco Delicado, tie oni parolis pri ĉi tiu dolĉaĵo ellaborata de la andaluzia ĉefrolulino.

#### Jen la ingredientoj por 4 homoj:



- Faruno (500 gramoj)
- $\frac{3}{4}$  da glaso da oliv-oleo.
- Sezamo (2 kuleretoj)
- Matalahuva anizo (2 kuleretoj)
- Dolĉa vino (1 glaso)
- Anizo (1 glaso)
- Iomete da salo
- 1 ŝelo de citrono
- Sukero
- Oleo taŭga por fritiĵoj.

#### Jen la preparado:

1. Varmigu la oliv-oleon. Sur ĝi metu la ŝelon de citrono por aromigi la oleon.

2. Kiam la citrono ŝajnas or-aspekta, demetu la paton el la fajro, demetu ankaŭ la ŝelon de la citrono kaj aldonu la sezamon kaj la matalahuvan anizon.
3. Ene de bovlo ni metas la farunon, lasu vakan lokon meze de la faruno. En ĉi tiun malplenan lokon verŝu la oleon kaj la ceterajn ingredientojn, escepte la sukero.
4. Knedu la tutaĵon dum kelkaj minutoj. Poste tiu tutaĵo devas ripozi dum 30 minutoj.
5. Post tiuj 30 minutoj formu buletojn, similformaj al nukso. Poste streĉu ĉiun buleton kaj pretigu ĝin laŭ la formo aperanta sur la fotografiaĵo.
6. Fritu ĉiun pecon ene de la oleo taŭga por fritiĵoj, verŝu sufiĉe grandan kvanton da oleo.
7. Kiam ĝi estos fritita demetu ĝin el la oleo, ĉiu *pestiño* devas ripozi dum kelkaj minutoj sur kuireja papero por ellasi la oleon.
8. Pulvore disŝutu ĉiun *pestiño* per sukero.
9. Bonan apetiton !!

### Ĉi-recepta vortaro:



Faruno




Sezamo



Oliv-oleo



Matalahuva anizo



Sukero



Dolĉa vino



Citrono




Bovlo


## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

### La orakolo de la Templo de Heraklo

Kvankam neniu arkeologia restaĵo tion pruvas, oni diras, ke la urbo Kadizo fondiĝis komence de la 12-a jarcento antaŭ Kristo. Tio okazus kelkaj jardekoj post la fino de la Troja milito. Tutcerte la fenicoj fondis la urbon kun komercaj celoj, ili establis setlejon en la loko kie la mondo tiutempe konata finiĝis. Tamen el la geografia vidpunkto tiu zono estas tute malsimila al tiu nun ekzistanta, tiel hodiaŭ Kadizo stariĝas en duoninsulo unuigita al apuda teritorio pere de terkolo, kaj en tiu epoko la urbo *Gadir* stariĝis en insulo nomita *Kotinususa*.



Geografio de Kadizo kelkaj jarcentoj antaŭ Kristo



Kadiza geografio nuntempe

En la 1-a jarcento p.K. la romia historiisto Strabono parolas pri urbo nomita *Gadeira*, tie ekzistis sanktejo starigita honore al dio *Melkart* sur la orienta parto de la plej granda insulo. Tiutempe tri

grandaj insuloj ekzistis en tiu zono kiu nuntempe nomiĝas Kadiza Golfo. Maro kaj vento ŝanĝis dum jarcentoj tiun zonon kaj hodiaŭ la urbo Kadizo, tiutempe *Gadeira* aŭ *Gadir*, stariĝas sur duoinsuleto unuigita al la kontinenta parto. La orienta parto de tiu antikva insulo *Kotinusa* hodiaŭ estas la insuleto kun la nomo *Sancti Petri*.




Insuleto *Sancti Petri* nuntempe

*Silio Italico*, romia verkisto de la 1-a jarcento p.K., skribas pri la templo de *Melkart* en *Gadir*. Temis pri granda konstruaĵo ĉe kies ĉefa enirejo stariĝis du grandaj kolonoj, sur la frontispico oni rakontis per bronzaĵoj la 12 laborojn plenumitajn de Heraklo. Antaŭ tiuj grandaj kolonoj la maristoj prezentis siajn oferdonojn, ĉefe ili petis al la dio bonajn ventojn dum siaj vojaĝoj, ni ne devas forgesi, ke *Gadir* estis urbo kies ĉefa rimedo estis la komerco kun aliaj fenicaj setlejoj.

Heraklo aŭ Herkulo estis filo de Zeŭso kaj Almeno trompita de la dio, kiam li simulis esti ŝia edzo por amori kun ŝi. La diino Hera, edzino de Zeŭso, ĵaluzeme malamamis Heraklon kaj plurfoje provis mortigi lin, tamen ekde sian infaneco Heraklo, kiu estis duondio, montris sian forton. Por liberiĝi de la malamo de la diino Hera Heraklo devis plenumi “dek du laborojn”.

Siafoje, *Melkart* estis fenica dio kiu protektis setlejojn, urbojn kaj la kamparon. Pro tio li estis la dio plej honorigita en ĉiuj fenicaj

setlejoj, inter ili *Gadir*, tie la templo de la dio *Melkart* reale estis dediĉita al duondio Heraklo. Alia romia historiisto *Pomponio Mela* skribis, ke sub la templo estis entombigita Heraklo mem, krome aliaj relikvoj de la 12 laboroj plenumitaj de la duondio troviĝis en la templo, tiel la zono de Teukro, konsiderata kiel la plej lerta arkopafisto en Grekio, kaj la arbo de Pigmaliono, kies fruktoj estis smeraldoj.



Modela rekonstruo de la templo de la dio *Melkart* en *Gadir*

Meze de la templo troviĝis granda korto, tie bruliĝis eterna fajro vivigita de la sacerdotoj. Multaj homoj pilgrimis al tiu sanktejo por peti la protekton de Heraklo. Oni diras, ke la kartaga militestro Hanibalo venis en la templon por peti la helpon de la duondio kaj ricevi la orakolon de la sacerdotoj antaŭ ol ekigi la konkeron de la itala duoninsulo.

Tamen, la plej fama kaj mistera orakolo havis kiel ĉefrolulo Julio Cezaro mem. En la jaro 68 a.K. Julio Cezaro venis en la Betikan romian provincon, tio estas en la sudo de la Ibera Duoninsulo, plimalpli la nuntempa Andaluzio. Li estis nomumita kvestoro kies ĉefa tasko estis administri la financojn de la provinco kaj ankaŭ agi kiel juĝisto nome de la romia guberniestro. Julio Cezaro rilatis kun grava kaj monriĉa kadiza komercisto, *Lucio Cornelio Balbo*. Okaze de unu el sia


vizitoj en *Gadir*, Julio Cezaro iris en la templon de la dio *Melkart*, tie stariĝis antaŭ statuo de Aleksandro la Granda, la makedonia reĝo kiu jam 30-jaraĝa regis preskaŭ la tutan mondon. Julio Cezaro ploris antaŭ la stauto, pro la fakto ke li mem, eĉ pli maljuna ol Aleksandro, ankoraŭ plenumis nenion grava. Julio Cezaro ankaŭ rakontis al la sacerdotoj en la templo, ke li ofte sonĝis pri sia patrino.

La sacerdotoj tiam interpretis tiun sonĝon kaj ili eldiris sian orakolon: Julio Cezaro estus homo kies plenumota tasko estus regi la mondon....kaj tio vere okazis. Post du jardekoj Julio Cezaro estis nomumata de la romia senato konsulo, militestro kaj ĉef-sacerdoto, poste eĉ imperiestro. Kiel instruas al ni la historia, Julio Cezaro eĉ estis unu el la plej potencaj viroj de la antikva historio kaj lia rolo estis gravega en la procedo de la malapero de la romia respubliko kaj ĝia transformo al imperio. En la jaro 42 a.K. la romia senato eĉ proklamis lin oficiale kiel unu el la romiaj dioj.



Julio Cezaro 100 a.K / 44 a.K.

## Nuda Krucvortenigmo




### *HORIZONTALALE*

- A. En la aŭtomobiloj de Luksemburgio.
- B. Sen la lasta vokalo, energia ago de la koro aŭ de la menso al ia celo.
- C. Nomo de la plej granda eŭropa montaro.
- Ĉ. Akuzative, rilata al lingvoj, estiĝintaj per la uzo de eŭropaj lingvoj fare de afrikdevenaj sklavoj kaj iliaj mastroj.
- D. Inverse, ago de tiu kiu mortigas homon.
- E. Morfemo montranta nedefinitan, sed plej ofte malgrandan kvanton.
- F. En la japanaj aŭtomobiloj.

*VERTIKALE*


1. Simbolo de grava industria kemiaĵo.
2. Kolekto de objektoj.
3. Paroli antaŭ juĝisto por defendi aferon.
4. Plurale, besto kun longaj oreloj kaj longaj postaj kruroj kiu rapide saltkuras, ĝi kuŝas en tersurfaca kavo.
5. Inverse kaj akuzative, hibrido de azeno kaj ĉevalino.
6. Tuj post tiam.
7. Finaĵo de akuzativo.

**Rebuso**

- **Kion vi ĉasis hieraŭ en la kamparo?**
-



**Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.**



**Solvo al la pasintnumera Rebuso.**

- *Kion li atingis en la konkurso?:*  
**LA TRIAN POSTENON**

Sur la bildo aperis “La 3-an” post la simbolo ¥, temas pri la simbolo de la japana monunuo nomita eno. Fine aperas la litero n.

Do *La trian .... post eno ..... n = “La trian postenon”*

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?  
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?  
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



## HUMURO



Ĉu mi rajtas provi ĉi tion antaŭ ol aĉeti  
ĝin ĉe Amazon?

La numero 113-a de nia revuo aperos meze de la monato marto 2020.  
Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla  
se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA  
Apartado de Correos 3142  
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García  
Sekretario: José María Rodríguez Hernández  
Kasistino: María Dolores Torres Mateo  
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López  
Juan García del Río  
Carlos Spinola  
Alejandro Burgos Escalante  
Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)  
[cordoba@esperanto.ac](mailto:cordoba@esperanto.ac)

TTT-paĝo: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)


[www.esperanto-andalucia.info](http://www.esperanto-andalucia.info)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)



Aviz-tabulo en la Gimnazio “Almenara” de Vélez-Málaga (Malago)